

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

---

## IPR

Organo de Internacia Ligo  
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

---

**Jarkolekto 14**

**N-ro 1, 1984**

## Internacia Pedagogia Revuo – n-ro 1, 1984

Presado: Offset Massarosa, Tel. (0584) 93.090

Kompostado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antverpeno

### Enhavo

1. Letero de la Ĝenerala Sekretario de ... al la Infanoj de la Mondo
2. Iom pri Skofja Loka, loko de nia 18-a konferenco
3. Fonemo kaj sono en Esperanto E.A. Bokarev, Informilo de BEA
4. Sukcesaj lernantoj de fremdaj lingvoj AALE-Bulteno
5. Ludteatraĵeto AALE-Bulteno
6. 2-a „Tago de la Lernejo” en la 68-a UK en Budapeŝto  
Z. Barcsay kaj H. Behrmann
7. Ĝustigo de vortuzado en faka artikolo pri aŭdovidaj rimedoj  
Bernard Golden
8. Kiel Bretono iĝis reĝo de Anglujo prezentita de F. Le Magadure
9. La reala evoluo de la vortrezoro en planlingvo W. Bormann
10. Ĉu ni bezonas novan sufikson? Malte Marheden

## Letero de la Ĝenerala Sekretario de ... al la Infanoj de la Mondo

Por la 18-a de Majo, ...

Hodiaŭ estas la „Tago de Bonvolo” kaj la aero estas plena je mesaĝoj de amikeco, kiujn la Radio-stacioj dissendas: mesaĝoj de la infanoj de Kimrujo kaj la respondoj, kiujn sendis al ili la infanoj de la kvin kontinentoj kaj de la malproksimaj insuloj. La voĉoj de la junaj homoj, kiuj en via nomo parolas antaŭ la radio, ĉiuj esprimas la bonan volon de tiuj, kiuj ankoraŭ ne atingis la aĝon de 15 jaroj kaj ilian deziron al komuna laboro por la bono de ĉiuj. Ĉar hodiaŭ estas la 18a de Majo, la Tago de Bonvolo.

Sed kiel estos morgaŭ? Kion vi faros morgaŭ por plenumi viajn promesojn? Morgaŭ vi eble aŭdos pri konkuradoj kaj pri disputoj, kiuj disigas viajn respektivajn patrujojn, pri malnovaj, amaraj kvereloj el iu malfeliĉa pasinteco, kiuj nur tre malfacile estas forigeblaj. Morgaŭ vi eble kun senkuraĝiĝo demandos al vi, kian utilon havas forta laborado, ĉar spite de tio viaj gepatroj estas senlaboraj. Morgaŭ vi eble renkontos homojn, kiuj priridas viajn mesaĝojn de hodiaŭ: „Estas nur vortoj, nenio krom vortoj”, ili diros. „Kian bonon faros belaj vortoj?”

Kaj efektive estas la vero, ke tio, kion ni bezonas, estas agado. Ĉu vi kredas, infanoj, ke por solvi problemojn, finigi malpacojn, forgesi malamon kaj por ĉesigi senlaborecon, sufiĉas, ke ne estas tiel. Ĉi tiu kompatinda, freneza mondo bezonas pli efikajn rimedojn. Ĝi bezonas nin, ĉiujn. Al ni ĉiuj kaj precipe al la junularo la tasko, iom restarigi la ekvilibron, kaj la komprenon pri ĝustaj proporcioj en la mondo. Kiel vi faros tion? Per studado kaj poste per agado.

De morgaŭ vi klopodos ekzerci vin en sinkontrolo kaj sinregado: Vi lernos resti trankvilaj kaj objektivaj, por ke vi estu kapablaj nepartie studi la kaŭzojn de ĉiuj tiuj malpacoj.

Tiam vi povos fari decidojn en viaj propraj landoj, vi konos ĝisfunde ĉi tiujn delikatajn aferojn kaj vi kapablos trankvile ekzameni ilin kun la koncernaj popoloj, ĉu amikoj aŭ malamikoj. Vi scios kiel trovi la justajn kompromisojn, nur petante honestajn kaj egalajn oferojn de la kontraŭaj partioj. Vi scias same bone kiel mi, ke finigi dispu-

ton per batalo ne estas la taŭga maniero por trovi justan, racian kaj daŭran solvon; male, tio nur kondukas al malamikaj sentoj kaj al la kreado de novaj malfacilaĵoj.

Do firme decidu eklabori. Ĉar vi devos batali pacience, kaj lojale kontraŭ senfina nembro da senkompataj malamikoj. Ĉu mi diru al vi kelkajn el ĉi tiuj teruraj malamikoj, kiujn vi devos venki? Kelkaj estas naturaj katastrofoj kiel ekz. inundoj, sekeco kaj nutrajmanko. Aliaj estas malsanoj, epidemioj, plagoj. Krome estas mizero, malpureco, malklereco, timo, sklaveco, senlaboreco kaj aliaj aferoj.

Kaj ĝuste tial ... ekzistas. Ĝuste tial ĝi devas fariĝi pli forta kaj pli efika. La ... povas organizi mondatakojn kontraŭ katastrofoj, kontraŭ malsanoj, mizero, senlaboreco, malordo kaj malŝparemo.

La ... bezonas virojn kaj virinojn por heroa batalado, ne kontraŭ aliaj homoj, sed kontraŭ tiaj malamikoj, kiajn mi menciis. Ĝi klopodas instigi la homojn forĵeti la militon kiel metodon por finiĝi siajn malpacojn kaj fari tion per arbitracio kaj per kunlaboro.

**Ĉu la mondo kaj ĝiaj problemoj multe ŝanĝiĝis? Jen fama alvoko al la infanoj de la mondo.**

**Kiu enordigos ĝin tempe kaj deinstance?**

**Bonvolu skribi! (IPR)**

## Iom pri Ŝkofja Loka, loko de nia 18-a konferenco

Ŝkofja Loka estas signifa slovena urbo en la regiono Gorenjsko. Laŭvoje ĝi situas nordokcidente 23 km de Ljubljana kaj 12 km sude de Kranj. Ĝi kuŝas sub orienta deklivo de montetaro de Loka, kiu orienten dislarĝiĝas en kamparon de la rivero Sora kaj okcidenten al valoj de Poljane kaj Selca.

En la mezepoko iris trafiko el la valo de Ljubljana tra Loka al valo de Poljane kaj pluen al Friulio kaj Triesto.

La nomo Loka, urbeto inter konfluo de du riveretoj, nomataj Sora, aperis la unuan fojon en historiaj dokumentoj en la jaro 973. Tiun jaron la germana imperiestro Oto II-a donacis la teritoriojn de la valo Selca kaj Poljane al episkopoj de Freising el Bavario. Pli poste, en la jaro 1033 la teritorio de Freising havigis al si ankoraŭ la valon de Supra Sava ĝis la vilaĝo Dovje.

En la historiaj dokumentoj oni trovas por la urbo plurajn formojn: Lonca (973), Loka (1074), Lack (1192). En germanaj dokumentoj oni trovas ĉiam la nomon Lack aŭ Bischoflack. En romanaj dokumentoj la loko estas nomita Scophelcus, Scufialocka, Sokufega Lucka. En la 13-a jarcento aperas slovena nomo Ŝkofja Loka. En la dokumento en 1274 la lokon oni jam nomas urbo. La situo de la urbo estis favora ankaŭ el defendaj vidpunktoj. De tri flankoj la urbo estas ĉirkaŭita de akvo, en okcidenta flanko de la kastelo. Pro la pli bona sekureco oni ĉirkaŭigis la urbon ĝis la jaro 1318 per muro en kiu estis kvin pordegoj.

Loĝantaro en la urbo estis de slovena kaj germana naciecoj. En la ĉirkaŭaĵo ĉefe vivis slovenoj. La plej multo el la loĝantaro estis metiistoj.

Kune kun la metio evoluis ankaŭ komerco. Komerci rajtis nur urbanoj. Episkopo de Freising en la jaro 1451 malpermesis komerci al kamparanoj – subuloj de la urbo. Laika aŭtoritato apartenis al la episkopoj de Freising, sed eklezia aŭtoritato apartenis al patriarko de Aquilea.

Ĉefa oficisto estis administranto. Li estis episkopa anstataŭanto. Katastron, en kiu estis listo de ĉiuj subuloj gvidis anstataŭanto de la administranto. La administranto estis juĝisto al la subuloj de Loka. Urbanoj havis sian urban juĝiston kaj urban konsilantaron.

Grava oficisto estis grendeponisto, kiu kolektis impostojn en naturaĵoj. Grenon kaj aliajn naturaĵojn li akceptadis en grendepono sur la hodiaŭa Spodnji trg (Suba placo). – Tasko de la grendeponisto estis ju plej baldaŭ disvendi la varojn. Ĝis kiam la greno restis en la depono, kamparanoj ne rajtis vendi siajn produktojn.

Por la urbo Loka estis kriza jaro 1439. La ĉirkaŭaĵo de Ŝkofja Loka estis scenejo de sangbataloj inter grafoj de Celje kaj imperiestra soldataro. En la jaro 1457 la armeestro de Celje Jan Vitovec bruligis pro venĝo preskaŭ la tutan urbon. En la jaroj 1471 kaj 1476 atakis la fortikigitan urbon turkoj. La urbo mem ne estis konkerita, sed turkoj detruadis kaj bruligadis en la ĉirkaŭaĵo.

Forta tertremo la 26-an de marto 1511 multe detruis la urbon. Ruinigitaj estis turo sur Krancelj, malnova kastelo super Vincarji, la kastelo de Loka kaj la grendepono.

Episkopo Filipo konstruis en la jaroj 1513 ĝis 1526 la hodiaŭan kastelon kaj renovigis la urbon.

En la jaro 1660 forbrulis Mestni trg (Urba placo), en 1698 la brulo neniigis Spodnji trg (Malsupra placo), nomata Lontrg.

La muroj iom post iom perdis sian signifon kaj ĝi komenciĝis disfali. La plej grandan parton de la muro oni forigis post la jaro 1789. Konservigis la suda parto apud Graben, ĉe la hodiaŭa komunuma domo.

La potenco de la episkopoj de Freissing ĉi tie daŭris de la jaro 973 ĝis 1803, do 830 jarojn. En la jaro 1803 la habsburganoj eksproprigis la tutan posedaĵon de la episkopoj de Freissing. Per tiu disproprigo la urbo Ŝkofja Loka perdis sian aŭtoritatkarakteron.

Nur post la unua mondmilito komenciĝis en Ŝkofja Loka evolui industrio: ligna, pela, teksa kaj ĉapela.

Pli fortan ekonomian progreson la urbo komencis akiradi post la dua mondmilito.

**Kiu deziras pli da informoj pri detaloj de la postkongresaj tagoj, bonvolu turni sin al s-ino Anja Hurĉak (vidu dorsan paĝon de IPR pro la adreso!)**

## Fonemo kaj sono en Esperanto

Prof. E.A. Bokarev

La moderna lingvoscienco uzas la terminon „fonemo”. La fonemo estas sono, kiu kapablas diferencigi sencon de vortoj kaj vortformoj. Ekz. en Esperanto „b” kaj „v” estas apartaj fonemoj, ĉar ili diferencigas sencon de vortoj: **bal**o-**val**o, **rabi**-**ravi**; „o” kaj „u” same estas apartaj fonemoj, ĉar ili diferencigas sencon de vortoj: **sono**-**suno**, **roso**-**ruso**. Sed ne en ĉiuj lingvoj ekzistas tiuj fonemoj. Ekz. en hispana kaj novgreka „b” kaj „v” estas variantoj de la sama fonemo kaj en ili ne ŝanĝiĝas la senco de la vorto, se anstataŭ „b” oni prononcas „v” aŭ inverse. Same pri „o” kaj „u”. Ekzistas lingvoj (ekz. *lezgina* en Kaŭkazo), kie ili estas nur variantoj de la sama fonemo, do la senco de vortoj ne ŝanĝiĝas, se anstataŭ „o” oni prononcas „u” aŭ inverse.

La lingvoscienco, kiu okupiĝas pri fonemoj, nomiĝas *fonologio*, sed pli ĝuste *fonematiko* aŭ *fonetiko*. La kvanto de fonemoj en certa lingvo estas pli-malpli preciza, kalkulebla; la kvanto de ĉiuj reprezentantoj de iu fonemo (variaĵoj, variantoj, alofonoj) praktike ne estas kalkulebla, ĉar ili aperas pro plej diversaj kaŭzoj (asimilado, disimilado, dialekta kaj individua prononcmankado, stilo de prononcado ktp.), kaj ilia kvanto dependas ankaŭ de precizeco de la parolanalizo.

En Esperanto ĉiu fonemo estas skribe reprezentita de speciala litero. Pro tio ni nomas la Esperantan ortografion *fonetika* aŭ *fonemika* (ankaŭ *fonematika*). Ĉar la fonemo diferencigas sencon de vortoj kaj vortformoj, do *nia unua kaj ĉefa postulo de korekta prononcado en Esperanto estu strikta diferencigo de ĉiuj ĝiaj fonemoj*. Niaj instruantoj de Esperanto devas esti tiurilate tre postulemaj kaj rigoraj. En ĉiuj naci-lingvaj lernolibroj ĉiam devas esti avertoj pri fonemikaj prononceraroj, specifikaj por tiu aŭ alia nacio. Ni penu, ke ĉiu fonemo havu apartan prononcon kaj ne koincidu kun iu alia. Ĉiu lingvo havas sian propran sistemon de fonemoj, do anoj de ĉiu lingvo, studante Esperanton, pro konflikto inter du fonemikaj sistemoj estas minacataj de iu serio de eventualaj prononceraroj.

Ekzemple, rusoj en senakcenta pozicio povas miksi „o” kaj „a”. Anstataŭ **oranĝo** ili povas diri **aranĝo**, anstataŭ **okcidento-akcidento**, same **komp**aro-**kam**paro, **organ**o-**arg**ano, **poŝt**isto-**paŝt**isto ka. Precipe grava estas la eraro, kiam tiuj fonemoj miksiĝas en gramatikaj finaĵoj: anstataŭ **bono**-**bona**, anstataŭ **koro**-**kora**, aŭ anstataŭ mi

Ekzemple, rusoj en senakcenta pozicio povas miksi „o” kaj „a”. Anstataŭ **oranĝo** ili povas diri **aranĝo**, anstataŭ **okcidento-akcidento**, same **komp**aro-**kam**paro, **organ**o-

argano, poŝtisto-paŝtisto ka. Precipe grava estas la eraro, kiam tiuj fonemoj miksiĝas en gramatikaj finaĵoj: anstataŭ bono-bona, anstataŭ koro-kora, aŭ anstataŭ mi venos-mi venas ks. En la sama senakcenta pozicio ruso povas miksi „e” kaj „i”: anstataŭ letero li povas diri litero ktp. La rusa lingvo ne diferencigas ankaŭ la fonemojn „g” kaj „h”: la nordanoj scias nur „g”, la sudanoj nur „h”. Tiel rusoj iufoje povas erari mikskante tiujn fonemojn: galo-halo, gardi-hardi, gufo-hufo, gasti-hasti, gisi-hisi ka.

Intercetere oni povas noti, ke iuj eŭropanoj ne ĉiam bone prononcas „r”. Ekzemple, angloj en iuj fonetikaj pozicioj prononcas ĝin tre malforte, preskaŭ nule, neaŭdeble por reprezentantoj de iuj aliaj lingvoj. Tio povas kaŭzi miskomprenon: verki-veki, surda-suda, karto-kato, tigro-tigo, korto-koto, frako-fako k.a.

Kiel lastan pekon kontraŭ Esperantaj fonemoj mi tuŝos nuligon de „h” en parolado de francoj, italoj kaj kelkaj aliaj nacioj, kio ankaŭ povas produkti miskomprenon: horo-oro, haro-aro, homaro-omaro, hordo-orodo, hajlo-ajlo, halo-alo, hardi-ardi k.a.

Principe malpli grava estas normigo de prononco de alofonoj, t.e. de diversaj variantoj de fonemoj. Estas indiferente, ekzemple, ĉu oni prononcas palatizitan aŭ malmolan „ŝ”, „ĉ” en la vortoj ŝipo, ĉelo; voĉan aŭ senvoĉan „h”, „j” en la vortoj homo, fojno. Ordinare ni eĉ ne perceptas la fonetikan diferencon de tiuj alofonoj, de diversaj variantoj de la samaj fonemoj. Pro tio la tiel nomata problemoj pri vasteco kaj longeco de Esperantaj vokaloj estas tute malprava kaj sensignifa. Esperanto ne havas diferencon inter vokalaj fonemoj laŭ ilia vasteco kaj longeco, kaj tiun diferencon inter koncernaj alofonoj povas percepti nur ano de tiu lingvo, kie ekzistas tia diferenco inter la fonemoj. Tamen iufoje estas grava la demando pri alofonoj. Ekzemple, rusoj ofte moligas (palatizas) dentalan „t” en pozicio antaŭ vokaloj „e” kaj „i” keĵ en tiu pozicio ĝi povas esti perceptata kiel varianta de „c”, sed ne de plosivo „t”: timo-cimo, titro-citro, tiklo-ciklo. Do uzado de palatizita alofono de „t” ne estas rekomendinda.

Lastloke ni okupiĝu pri asimilado de sonoj en parolĉeno. Distance proksimaj sonoj povas influi unu la alian iurilate. Se posta sono influas la antaŭan, la asimilado estas nomata regresiva: ekzisti-egzisti; se la antaŭa sono influas la postan, la asimilado estas nomata progresiva: diversa-diverza. Ĉar Esperanto estas fonetika lingvo kaj ĉiu aparta fonemo en ĝi ne devas koninci kun iu ajn alia, la proceso de asimilado ne devas esti rekomendata.

Ne estas rekomendata ankaŭ alia eventuala fonetika procedo en la parolĉeno, kiu povas aperi en Esperanta prononco pro influo de naciaj lingvoj, ekzemple apero de „j” inter vokaloj: ĉijelo anstataŭ ĉielo, pijedo anstataŭ piedo, miĵa anstataŭ mia k.a.

Do ni povas konkludi pri strikta diferencigo de unueca prononco en Esperanto, oni parolas precipe pri strikta diferencigo de fonemoj, sed plej ofte oni ne povas insisti, ke iu speciala alofono estu sola reprezentanto de la koncerna fonemo. Do ni rigore obeu la principon de fonemikeco, kiu estas esence grava de l’ vidpunkto de interkompreno sed estu toleremaj al tio, kio estas sensignifa de tiu vidpunkto.

El „Informilo 83/84 BEA”

**Ĉiu sekcio havas interesaĵojn por niaj gelegantoj. Bonvolu sendi.**

6 — 1984 — IPR-Internacia Pedagogia Revuo

## Sukcesaj lernantoj de fremdaj lingvoj

AALE-Bulteno 78, 1983

Laŭ raporto de la esplorada instituto „Ontario Institute for Studies in Education” en 1975, **sukcesaj lernantoj de fremdaj lingvoj** havas la jenajn trajtojn:

1. Facileco en la apartigo de informado de nerilataj sonoj
2. Supera kapableco trakti ion novan, malsaman, paradoksan
3. Kapableco apartigi la lernatan lingvon de la naskiĝa lingvo kiel apartaj sistemoj
4. Ekstraverteco; iom da atakemo, aŭdaco
5. Kompreno pri sia propra lerno-stilo
6. Trankvileco kiam oni riskas
7. Aktiva serĉado por okazoj uzi la lernatan lingvon
8. Bonega kapableco diveni
9. Atento al ne nur signifo sed ankaŭ al lingva formo
10. Atentemo al la sentoj de aliuloj.

Jen rekomendoj pri la instruado de talentaj lernantoj de fremdaj lingvoj:

- Enkonduki la instruadon pli frue ol kutime
  - Donu okazojn al ili labori kun talentaj samaĝuloj
  - Disponigu al ili taŭgajn legaĵojn
  - Partoprenigu ilin en malpli da parkerigaj ekzercoj, pli da verkado
  - Donu okazojn por sendependa esplorado
  - Petu ilin instrui al aliaj lernantoj
  - Laŭdu iliajn atingojn
  - Donu tiajn estrajn rolojn kiaj direkti teatraĵojn, ludojn, aŭdo-vidajn erojn
- (Tradukita el artikolo „The Role of Foreign Language Education for the Gifted and Talented Student” en FOREIGN LANGUAGE ANNALS No. 5, 1982.)

# Ludteatraĵeto

## AALE-Bulteno 78, 1983

Lastan someron en Viena restoracio dum postkongresa renkontiĝo, pli ol cent Esperantistoj el dek du landoj partoprenis la jenan amuzan *lud-teatraĵeton*, kiun sprite direktis la ĉef delegito Max Finkensteller. La unuopaj roluloj ne parolis, sed nur faris taŭgajn gestojn, kaj la grupo aktive partoprenis.

Estro: La kurteno malfermiĝas.

(Rolulo gestas; grupo aplaŭdas)

Estro: La vento blovas.

(Grupo laŭte blovas)

Estro: Ekpluvas.

(La grupo rapide batas la manojn sur tablo)

Estro: La luno malaperas

(Rolulo kovras la vizaĝon per mantelo)

Estro: La suno leviĝas.

(Rolulo malkovras la vizaĝon kaj ridetas)

Estro: La koko krias.

(Rolulo kokerikas)

Estro: La hundoj bojas.

(La grupo bojas)

Estro: La katoj miaŭas.

(La grupo miaŭas)

Estro: La geamantoj enamiĝas.

(Rolulo al rolulino: Mi amas vin!)

Estro: La geamantoj malaperas malantaŭ la arboj.

(La roluloj foriras)

Rolulo: (Frapante la pugnon sur tablon)

Kio okazas tie ĉi?

**Helpu niajn geinstruistojn per viaj kontribuoj.**

# 2-a Tago de la Lernejo en la 68-a UK en Budapeŝto

Zsuzsa Barcsay kaj Hermann Behrmann

Daŭrigante la komencitan laboron en Antverpeno (1982) en Budapeŝto ni okazigis la duan fojon la Tagon de la Lernejo. La programon honorigis reprezentantoj de hungaraj ŝtataj kleriginstancoj, nome la ĉefdirektoro de Landa Pedagogia Instituto kaj la estro de ĝia fremdlingva sekcio, reprezentanto de Ministerio pri Klerigo, estro de kleriga sekcio de Ĉefurba Konsilio, la direktoro de Ĉefurba Pedagogia Instituto kaj sekciestro ĉe Landa Sindikato de Pedagogoj.

La ĉefdirektoro de Landa Pedagogia Instituto, D-ro Miklós Szabolcsi salutis la Tagon kaj informis la partoprenantojn pri tio, kiun lokon nun okupas la Esperanto-instruado en la oficiala ŝtata instrusistemo kaj kian perspektivon ĝi havas. Li akcentis, ke la Esperanto-kulturo estas integra parto de la ĝenerala kulturo, kaj la edukado je Esperanto harmonias al la celoj de la hungara edukpolitiko.

D-ro Gyula Mezei, estro de kleriga sekcio de la Ĉefurba Konsilio alte taksis en sia konciza parolado la lingvoekzercigajn internaciajn tendarojn por gelernantoj de diversaj aĝgrupoj kaj denombris tiujn, kiuj lastatempe regule okazadas en Hungario.

Post la salutvortoj de la menciitaj du altrangaj oficuloj s-ro Baldur Ragnarsson (IS) malfermis la Tagon per sia enhavriĉa prelego pri la kadrotemo „Esperanto-instruado kiel kontribuo al interkultura informado”. El la prelego ni ellevas unu, sed ŝajne la plej gravan ideon: por ke la Esperanto-instruado povu plenumi interkulturan informadon, estas bezonate, ke ni havu modernan „tridimensian” lernolibron. La tri dimensioj estas la jenaj: 1. konoj pri la lingva sistemo de Esperanto; 2. prezentitaj cirkonstancoj por apliki la lingvon; 3. edukado de la kultura fono de la lingvo. „Ni povas kaj devas pli celeme enkonduki en niajn lernolibrojn de Esperanto temojn de aŭtentika, internacia edukvaloro” – tiel resumiĝis en la prelego tiu ĉi ideo.

Prof. D-ro István Szerdahelyi (H) eĉ pli konkrete parolis pri la socia-kultura fono de Esperanto, pri tiu instrumaterialo, kiun en naciaj lingvoj oni nomas „Landeskunde”, „Language and area”, „Langue et civilisation”, „stranovedjenije” k.s. Li denombris la konojn pri la itala kulturo kiujn devas ellerni gelernantoj studante la italan en hungaraj gimnazioj. La Esperanto-legolibroj de D-ro Szerdahelyi por gimnazianoj (16-18-jaruloj) enhavas informojn pri:

- internacia junulara movado,
- modernaj olimpikaj ludoj,
- internaciaj signosistemoj de trafiko,
- flugado, kosmonavigado (K.E. Ciolkovskij),
- Semmelweis,
- Ruĝa Kruco (H. Dunant),
- Ĉu la homaro havis komunan pralingvon?  
Deĉifro de malnovaj lingvoj (Champolion, Grotefend),
- La latina kiel internacia lingvo,
- internaciaj organizaĵoj  
(Monda Packonsilio, UN, UNESKO, UEA),
- internaciaj pacpremioj Lenin kaj Nobel,
- interlingvistiko: hungaraj planlingvo-projektoj;  
ekestoj kaj disvastiĝo de Esperanto;  
Esperantaj literaturo kaj movado.

La denombritaj konoj ne estas iu plua ĉapitro en la lernolibro, sed ili konsistigas la lecionojn de la dua lernolibro por gimnazianoj, tiel la lernolibro korespondas ankaŭ al tiu didaktika postulo, ke la legaĵoj ne estu pure ilustraĵoj al gramatiko, sed ili havu informvaloron.

La vicon de prelegoj daŭrigis s-ro Yosimi Umeda (J), kiu parolis pri „Instruado de Esperanto al internacia lernantaro en la San Franciska Ŝtatuniversitato en Usono”, krome – kiel kompetentulo pri komunikado – tre interesajn indikojn li diskonigis pri la kvanto kaj lingvoj de informaĵoj enfluantaj en Japanion.

Zsuzsa Barcsay (H) informis la ĉeestantaron pri la 1-a Metodika Seminario de UEA, okazinta en la antaŭkongresa semajno en hungara urbeto Gyula.

Sekvis du modellecionoj.

Tiu de Jozefo Horváth (H) impresis la aŭskultantaron per sia prepariteco: aro da transparentoj kaj manipuleblaj objektoj ilustris la instruatan materialon. La kursanoj havas pseŭdonimon dum la daŭro de la kurso por liberigi ilin de eventualaj inhiboj. Multaj ja interesiĝis ĉe la instruisto, ĉu transparentoj kun gramatikaj tabeloj ktp. estas aĉeteblaj. S-ro Alfonz Pechan, estro (jam de pli ol 40 jaroj!!) de la Ekzamena Komisiono de HEA asertis, ke dum mallongaj rapidkursoj oni ja povas akiri sufiĉe da lingvaj konoj, tamen estas bezonate poste diligente daŭrigi la lingvolernadon kaj apliki la lingvon por maturigi la sciojn. Aliaj partoprenantoj de la Tago turnis sin al la organizantoj: kiel eblas, ke en Hungario la adulto estas aŭŝita „instrumaterialo” por ilustru gramatikon.

Kelkaj okcidentanoj eksplikis, ke laŭ ilia moro en publikaj (lingvo-)kursoj oni evitas paroli pri religio, politiko kaj sekso por respekti individuajn opiniojn pri tiuj temoj; kelkaj el socialismaj landoj demandis, kiel tiuj aŭŝoj kaj la agresema korusa ripetado de (nacilingva) teksto en Esperanto-kurso harmonias al la spirito de edukado en nia socio.

La organizanto de la Tago – ankaŭ kiel gvidanto de la Instrua Komisiono de HEA – devas deklari, ke la partio kaj registaro en Hungario havas tute malajn edukcelojn: en lernejoj ni klopodas prepari la gelnantojn je harmonia familia vivo. Nia socio kaj registaro ĝismaksimume protektas la familiojn kaj prijuĝas tiujn, kiuj ne plenumas sian devon rilate al sia familio aŭ misuzas la liberecon, kiun la moderna socio ebligas al ĉiuj civitanoj; krome nia pedagogio estas libera de agresemo.

Do la prezentita metodo estas iniciato de privatuloj, fakte pirata metodo, kiel ili mem trafe nomas ĝin.

La modelleciono de Francisko Simonnet (F) prilumis gravan metodon, kiun oni traktas kutime nur margene, nome instruadon de kantoj. Pli precize: „instruado per kanto al lernantaro neegalnivela” (precipe dum kelktagaj aranĝoj, kiam oni devas „denulajn komencantojn” kaj preskaŭ flue parolantojn samtempe kaj malte de progresigi”). La instruisto elektu kanton kun ofta ripetado kaj ripetendajn vortojn kun malalta frekvenco. La oftajn vortojn la lernantoj ja ĉiukaze konas aŭ nepre lernos poste, sed ankaŭ la maloftajn ili alproprigas ripetante ilin en ĉiu strofo. La teksto kaj melodio estu simplaj. La kursanoj-kantantoj formu cirklon, tio estas psika postulo. La instruisto devas laŭte, distinge paroli, ĝuste gestikuli, bonritme kaj gaje kanti.

Aparte interesa programo sekvis poste: prezento de infanoj, denaske edukitaj je Esperanto en la familio. S-ino Barbara Pochanke (PL), patrino de tri gefiloj (ĉiuj partoprenintaj la IK-on) parolis pri siaj spertoj rilate al dulingveco en familio, etne unueca. Poste kelkaj geknaboj atendis kaj respondis demandojn de la kongresanoj. Ilia lingva instinkto, spontanea kaj lingve korekta parolo ne nur ravis la ĉeestantojn, sed espereble ankaŭ instigis ilin je Esperantlingva edukado de siaj infan-familianoj.

Dum la Publika Diskuto, gvidata de s-ino Irena Szanser (PL) manifestiĝis plej diversaj opinioj pri la enhavo de Esperanto-instruado (ĉu intensaj rapidkursoj, ĉu edukado inkl. kulturalan fonon estu preferataj; ĉu verki internacian lernolibron por komentantoj aŭ antaŭvidi transferojn inter Esperanto kaj diversaj etnaj lingvoj; kiel reciproke rekoni Esperanto-ekzamenon en diversaj landoj, ĉu unuecigi postularojn kaj nivelojn ktp.).

Novaj instruhelpiloj estis prezentitaj: bildserio kun broŝuro de Eva Benická (ĈS) kaj lingvodomeno de Katalin Zimonyi (H). Esprimiĝis ankaŭ intereso aperigi la materialon de la 2-a Tago de la Lernejo libroforme, kiel aperis ankaŭ la prelegoj kaj lecionoj de la 1-a Tago en la volumo Metodiko en la Praktiko (Paderborn resp. Budapeŝt).

Fine Baldur Ragnarsson resumis la spertojn, konkludojn de la Tago, konstatante, ke tiun tradicion oni devas daŭrigi, ankaŭ en Vankuvero okazigi Tagon laŭeble kunlabore kun ILEI.

La taskon de sekretario/protokolanto plenumis Marin Bacev (BG), la Tagon prezidis alterne la organizantoj Zsuzsa Barcsay kaj Hermann Behrmann.

**Sendu viajn spertojn al IPR.**

## Kiel Bretono iĝis reĝo de Anglujo

kaj tri rakontoj el

### La fiero-ĉevalo de Per-Jakez Helias

kiu verkis siajn librojn en la bretona kaj en la franca lingvoj  
El la franca tradukis Frédéric Le Magadure. Ilustris ĝin junaj anoj de la Esperantogrupo

**Vekiĝu!**  
Hennebont.

Dankon por iliaj konsiloj al  
**J.P. Beau, Ge-Lloancy,  
Ge-Rapley, J. Vincent.**

**G.E.E.**

Franca sekcio de ILEI

Prezo: unu ekzemplero:  
15 FF + sendkosto

Pago: Plenskribu viajn ĉekojn je la nomo de:

Ekde 5 ekzempleroj, 10 FF la unuopa + sendkosto 10%.

Mendo: ĉe Frédéric Le Magadure  
23, rue Jules Ferry  
F-56700 Hennebont

GRUPO DE ESPERANTISTAJ  
EDUKISTOJ

Franca Sekcio de U.F.E. kaj I.L.E.I.

Karaj legantoj,

Ni esperas plezurigi vin per la rakontoj de ĉi tiu libro; ni deziras ankaŭ iom klerigi vin. Esperantisto estas scivolema homo, ĉu ne?...

Por vi, ni eltiris kelkajn paĝojn el dika libro, **La fiero-ĉevalo**, laŭ la franca titolo. **La infanoj de l' gajemo** laŭ la bretona. Rimarkinde estas, ke P.J. HELIAS verkis tiun libron unue en sia unua lingvo, la bretona, kaj poste tradukis ĝin en la francan. Ĝi aperis france en fama kolekto „Terre Humaine” (Homa tero).

Kelkaj paĝoj kondukas nin en la mirindan mondon de rakontoj por infanoj; tial ni pensas, ke **La ŝranko de Onklo Koreteno la Maljuna** kaj kelkaj aliaj paĝoj samkarakteraj bone akordiĝas kun la unua rakonto.

Frédéric Le Magadure

Iam estis reĝo de Anglujo, kiu promesis edzinigi sian filinon al tiu, kiu alportos al li ŝipon kapablan veturi sur la maro kaj sur la tero. Liaj heroldoj distrumpetis la informon tra la mondo. Ĝi trafis la orelojn de juna Bretono loĝanta en kabano ĉe la rando de granda arbaro. Kaj la junulo eksopiris: la filino de la reĝo ne estas destinita al li...

## Kiel Bretono iĝis reĝo de Anglujo

„Kiam eknotiĝas, mia avo ekfabelas al du aŭ tri buboj, kiuj baldaŭ estas ses aŭ sep ĉirkaŭ li kun siaj korboj. Unue la virinoj, poste la viroj, iras hejmen por la vespermanĝo. Ne vidante la geknabojn reveni, ili maltrankviliĝas, reiras ĝis la kampo. La infanoj kunpremiĝas ĉe termuro; meze inter ili la lignoŝuisto rakontas Kiel Bretono iĝis reĝo de Anglujo. La gepatroj, ne kuraĝante interrompi la rakontanton, momente eksidas por lin aŭskulti. Poste, ili ne plu pensas leviĝi.”

P.J. Helias: Le Cheval d'Orgueil.  
La Fiero-Ĉevalo.



# Ĝustigo de vortuzado en faka artikolo pri aŭdovidaj rimedoj

Bernard Golden

La artikolo titolita „Teknologia prezenteco en la nuntempa lernejo” de Jozo Marević (IPR, 1983, n-ro 3, pĝ. 60-66) estas karakterizita per iom neortodoksa lingvouzo, postulanta detalan pritrakton. Ne sen kialo ankaŭ la redaktoro de la revuo fine de la artikolo listigas plurajn fakterminojn kaj aliajn neologismojn, ankoraŭ neregistritajn en *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) kaj ne glositajn de la aŭtoro. Mi havas la impreson, ke la verkinto de la studaĵo ne sufiĉe bone komprenas la principojn de vortformado en Esperanto; sekve de tio li ekuzas neologismojn, kiuj ne harmonias kun la strukturo de la Internacia Lingvo. Mi provos sisteme analizi tiun vortuzon, laŭeble donante difinojn de la fakterminoj kaj ankaŭ de kelkaj nebulaj esprimoj.

La neologismo „projektoro” estas uzata en kunmetaĵoj kiel „kino-projektoro”, „diaprojektoro” kaj „dia-epi-epidie[!]-projektoro”. Tiu ĉi termino estas balasta aldono al la zamenhofa lingvo, sendube enkondukita sub influo de etnolingvaj vortoj kiel la angla *projector*. Esperanto jam de longe havis la vorton „projekciilo”, difinitan en PIV kiel „aparato por projekcii diafanajn bildojn sur ekranon”. La kvara difino de „projekcio” estas „luma bildo, sendata sur pli-malpli proksiman ekranon per speciala lanterno”. „Pojekcii” signifas „sendi luman bildon sur ekranon”. Rimarku la ekonomion de la vortformada procedo: unu radiko, „projekc-”, estas pluformebla por doni vortojn signifantajn la teknikon, la agon, la ilon kaj ankaŭ la rimedon, ĉar „projekciaĵo” estas „kliŝo survivita uzata por projekciado”. Ne estas eble tiel facile pluformi „projektor-”. Cetere, per aldono de prefiksitaj radikoj oni povas formi kunmetitajn vortojn, kiuj estas la nomoj de diversspecaj projekciiloj. „Kinoprojekciilo” estas sinonimo de „kinomatografo”, difinita en PIV kiel „aparato, projekcianta sur ekranon fotografajn lumbildojn, kies multeco kaj rapideco naskas iluzion de efektiva movo”. „Kino” estas la mallongigo de „kinomatografio”, la arto fotografie reprodukti la movadon.

Senmovaj bildoj estas projekcieblaj per diapozitivaj. Laŭ PIV „diapozitivo” estas „pozitiva fotografia kopio sur vitro”. Ĝia mallonga formo, uzata en kunmetaĵoj, estas „dia-”. „Diafilmo” estas serio da diapozitivaj kadroj sur filmstrio, „diateko” estas kolekto da diapozitivaj, kaj „diaprojekciilo” estas aparato por projekcii diapozitivajn

aŭ diafilmojn sen iluzio de movado. La vortformo „dia-epi- kaj epidie[!]-projektoro” estas barbarismo, ĉar en unu kunmetaĵo estas inkludita tro da signifoj. Ni vidis ĉi-supre, ke „diaprojekciilo” faras „diaprojektoro” superflua. La aliaj du prefiksoj bezonas pli detalan klarigon. En PIV troviĝas la vorto „epidiaskopo” difinita kiel „aparato povanta projekcii bildojn per surfalanta aŭ per trairanta lumo, tiel ke ĝi permesas projekcii ankaŭ ilustraĵojn el libroj ktp.” Rimarku, ke s-ro Marević en tiu ĉi kazo ne bazas sian vortuzon sur etnolingva modelo, ekzemple la angla *epidiascope*, aŭ sur la termino registrita en PIV, sed preferas nomi ĝin projektoro anstataŭ -skopo. La epidiaprojektoro, do, povas funkcii kiel diaprojekciilo kaj ankaŭ kiel „epiprojektoro”. En etnolingvoj tiu ĉi aparato estas konata kiel „episkopo”; ĝi povas projekcii nur maldiafanajn, opakajn bildojn. Pro tio ĝi estas nomata en la angla lingvo, krom *episcope*, ankaŭ *opaque projector*. Rimarku, ke se la formo „episkopo” estas enkondukita ĝi fariĝas homofono de la jam ekzistanta „episkopo”, la nomo de eklezia funkciulo. Enestas en PIV ankaŭ „diaskopo”, „projekciaparato por diapozitivaj”. Ankoraŭ unu projekciilo menciita de s-ro Marević estas „grafoskopo”. Ĝi devenas de la anglalingva fabrikmarko *Graphoscope*, sed etnolingve la terminoj varias por emfazi diversajn proprecojn de la aparato. La germana *Schreibprojektor* kaj la hungara *írásvetítő* indikas, ke skribaĵo aŭ desegnaĵo estas projekciita, dum la angla *overhead projector* kaj la franca *rétroprojecteur* signifas, ke la projekciado okazas sur ekranon malantaŭ kaj super la kapo de la instruanto. La uzo de „grafoskopo” en la koncerna artikolo estas nekonsekvenciaĵo, ĉar ankaŭ ĝi estas projekciilo, kaj s-ro Marević devis analogie nomi ĝin „grafoprojektoro”.

Pro la skemisma naturo de la planlingvo Esperanto, mi opinias, ke estas eble fari ordon en la nomenklaturado de la priskribitaj aparatoj per la uzo de leksika materialo jam ekzistanta en la lingvo, sen bezono de neologismoj. Ĉar la projekciado de bildoj sur ekranon okazas, jen per trairanta lumo, jen per reflektita lumo, oni povas nomi ĉiun aparaton projekciilo: la opakprojekciilo projekcias nur opakajn, maldiafanajn bildmaterialon, la diaprojekciilo projekcias diafanajn fotografaĵojn, kaj ambaŭ specoj de projekciaĵoj estas uzeblaj en la opakdiaprojekciilo. La grafikprojekciilo estas speciala ekipita por projekcii skribaĵojn, grafikaĵojn kaj desegnaĵojn, eĉ dum oni kontinue faras ilin. Tiel estas eble elimini „-skopo”, kies difino en PIV rilatas ne al projekciilo sed al alispeca aparato por kontroli nevideblajn fenomenojn aŭ en la medicino por ebligi esploradon de interno de organo.

Ankoraŭ unu „-skopo” menciita de s-ro Marević estas „magnetoskopo”, kiu ne estas projekciilo sed aparato funkcia simila al magnetofono; ĝi registras sur magneta bendo bildojn kaj sonon de la televido. En la angla ĝi estas *videotape recorder*, la franca nomo estas *magnetoscope*, la germana ekvivalento estas *Bildbandmaschine*, en la hungara ĝi nomiĝas *képmagnetofon* aŭ *képmagnó*, kaj la sveda nomo traktas videospelare. Germana kaj sveda Esperanto-vortaroj tradukas la etnolingvajn nomojn per „videoregistrato” kaj „televidea bendaparato” respektive. Mi proponas

„videobendaparato”, ĉar „video-” jam estas vaste uzata internacia radiko signifanta „televizio” kaj „televidado”. Pro tio la termino „vid-kaseto”, uzata de Marević, devas esti „videokaseto” aŭ plibone „videokasedo”.

La sekvaj rimarkoj koncernas misan vortuzon en la komunuza lingvo; temas ĉefe pri redundaj\* silaboj kaj neregula pluformado de vortoj surbaze de ekzistantaj radikoj. La kromaj elementoj ne aldonas iun signifon al la pli simplaj formoj. Marević skribas „radiilo” anstataŭ la jam longe enradikiĝinta „radio”, kiu estas mallonga formo de „radiofono”. Ĉar laŭdifine ĝi estas aparato, la sufikso „-il” estas superflua. Same balasta elemento estas la „-um” en „provizumado” kaj la „-if” en „intensifigo”; oni diru „provizado” kaj „intensigo”. Estas eble regule formi vortojn kun la signifoj de „normativo”: „normo”, „normigo”, „normigaĵo” kaj „normigado”. La neologismo „inovacio” ne estas bezonata, ĉar ekzistas sinonimoj kiel „ŝanĝo”, „novaĵo”, „novigo”, „novigaĵo” kaj „novenkondukaĵo”. Anstataŭ la longa „multobligaparato” estas pli ofte uzata „multobligilo”.

Pli gravaj estas semantikaj malĝustaĵoj. Anstataŭ „televideo de la fermita cirklo” oni diru „televideo de fermita cirkvito”. Stranga esprimo estas „enladigi la televidajn elsendojn”. Preparitaj manĝaĵoj estas anladigitaj; televidaj elsendoj estas surbendigitaj. Frazo en la artikolo tekstas: „... 107 lernejoj aŭ 74% posedas bibliotekon sen la apuda kazino.” Etnolingve la vorto „kazino” havas diversajn signifojn, sed tie ĉi la aŭtoro estis influita de speciala signifo, kiun ĝi havas en lia gepatra lingvo, la kroata. Sinonimo de *kasin* estas *ĉitaonica* „legosalono” aŭ „legoĉambro” kaj ankaŭ „rondo de legantoj”. En la kunteksto de la artikolo sensenca estas la esprimo „la multmedia centro”. Laŭ PIV „medio estas „homo kiu, laŭ la spiritisma doktrino, havas la kapablon servi kiel peranto inter la homoj kaj la spiritoj de la mortintoj”. Ĉar la artikolo pritraktas instruhelpilojn, mi proponas la terminon „la multerimeda centro” aŭ „la plurrimeda centro”.

Alian specon de kondamninda lingvouzo ilustras jena citaĵo: „Oni povas, prima vista, klarvidigi, ke la plej bonaj ekipaĵo [!] estas en matematiko kaj en kroata-serba lingvo...” „Prima vista” estas itala esprimo signifanta „unuavide”. Se ne estas eble esprimi tion en la zamenhofa lingvo, jam estas tempo agnoski, ke Esperanto ne taŭgas kiel internacia lingvo!

Estas ankoraŭ kelkaj vortoj en la artikolo, kiujn mi ne sukcesis klarigi. Ili troviĝas en la sekvaj frazoj:

1. „... oni konsideras, ke unu lernejo devas posedi 1-3 sistemkomunikatilojn...”
2. „Pli ol 50% de lernejoj ne havas responderon...”
3. „La komunikatorsistemon havas nur 27,27% de lernejoj...”

Konklude, mi deziras akcenti, ke mia analizo de la lingvouzo en la artikolo de s-ro Marević ne havas kiel celon rifuzi ĉiujn novajn vortojn en Esperanto. Ili estas bonvenaj, se ili vere estas bezonataj. Mi nur pledas por pli zorga vortformado surbaze de klare starigitaj principoj. Bedaŭrinde, tiuj principoj ankoraŭ ne estis formulitaj, do

ĉiu enkondukas neologismojn laŭ sia bontrovo, kaj la rezulto estas kaoso. Kiu ne kredas tion, esploru la historion da la vortoj „komputero”, „komputoro”, „komputilo” ktp.

## GLOSO

\* **redunda** – balasta, superflua. G. Waringhien en la suplemento de sia Esperanta-franca vortaro (1976) registras „reduanco” kiel ekvivalenton de la franca *reduance*. En la informatiko la termino rilatas al la parto de mesaĝo, kiu povas esti eliminata sen perdo de esenca informo. En la vortformo „reduanco”, „anc” estas redunda. Ĝi devenas de la latina participo *reduans*, kies infinitivo estas *reduare* „superbordiĝi”. En Esperanto sufiĉas la radiko „redund-” por pluformi la verbon „redundi” kaj la substantivon „redundeco”.

**Ĉu la stumpeta ILO estas progressa nomo por Esperanto? Diru vian opinion!**

# La reala evoluo de la vorttrezoro en planlingvo

Werner Bormann

Realaj evoluoj estas studeblaj nur ĉe la Internacia Lingvo. Tie skribsistemo kaj gramatiko estas stabilaj, sed evoluas la vortotrezoro. Tia evoluo eblas laŭ aŭtoritataj inventoj (kion multaj supozas), sed reale tio estas simple okazaĵo inter la uzantoj de tiu lingvo. Instigoj por novaj vortoj venas el la delikatememo de verkistoj, sed ankaŭ pro novaj fenomenoj kaj modernaj konsciĝoj el tutmondiĝo aŭ pro sendiskriminacia lingvouzo. Iom efikas ankaŭ ŝlifprocezoj. Kreas novajn vortojn laŭokazaj bezonantoj verkantaj tekstojn, kaj sisteme agas tiukampe vortaristoj, ĝeneralaj aŭ – ĉefe – fakaj. Konvencia bazo de ilia laboro estas la „Fundamento de Esperanto” kun sia 15-a regulo pri permesita transpreno de multelingve uzataj vortoj. La akceptado de tiuj novaj vortoj bremsiĝas antaŭ la bariero kontraŭ neologimoj, sed pro la vivanteco de la Internacia Lingvo tamen novaj esprimaĵoj venas en la vortotrezoron. Tiajn uzitaĵojn poste registras noveldonantoj de ĝeneralaj vortaroj kaj de terminaroj, tiel diskonigante la novaĵojn. Sampaŝe eksmodiĝintaj vortoj ekmankas kaj forgesiĝadas. Nur post tiuj eventoj sur la libera merkato de la parolantoj aperas oficiala instanco: la Akademio. Ĝi rekomendas kaj verdiktas; tiel ĝi influas la evoluon. La ĝenerala kompreneblo kaj la homogeneco de la ingvo konserviĝas malgraŭ tiu plurrela evoluo pro la firma konvinko de la uzantoj, ke ĉiu esprimu sin kun la celo de klara kompreno fare de la adresitoj. Al tiu unueco forte kontribuas normigaj verkoj kiel ĉefe „Plena Ilustrita Vortaro”. Preskaŭ 100 jaroj de reala evoluo en la Internacia Lingvo pruvas, ke tiu deomokratia metodo taŭge efikas. La supre menciitaj „instigoj por novaj vortoj” kun siaj pluraj kaŭzoj formas la ĉefan parton de tiu ĉi teksto. En ĝi troviĝas multaj ekzemploj por klarigi la evoluon per spertoj el la realo. Tiuj ekzemploj sekvas la jenan skemon:

1. Delikatememo de verkistoj. Vortkreatoj pro tiu ĉi kaŭzo estas objekto de la diskuto, eĉ disputo pri „neologismoj”. Pli da vortoj por diversaj nuancoj ebligas pli variajn tekstojn, sed samtempe ili malfaciligas la lernadon.
  - a) Kaŭzo belsono. Ĉefa ekzemplo estas la neologismoj, kiuj anstataŭu la vortojn komenciĝantaj per la prefikso „mal-”; kurta, lanta, liva. Praktikaj ili estas en kunmetitaj vortoj: la ondolongo, en kiu dissendas radiostacio en la Internacia Lingvo, estas la „mallonga”, sed eĉ kontraŭuloj de neologismoj preferas la esprimon „kurtonda” anstataŭ la peza „mallongonda”.

- b) Kaŭzo variaĵoj. Por tuta aro da esprimoj ekzistas kaj internacia radiko kaj vorto kunmetita el facile konataj radikoj: ekzemplo estas la paro hospitalo/malsanulejo.

Menciinda estas la fakto, ke ne ĉiuj proponaĵoj estas akceptitaj de la kolektivo de la uzantoj de la Internacia Lingvo. Ekzemplo por tio estas la germandevena vorto „gemuta”; por karakterizi tiun (kiel oni diras: tipe germanan) agrablan etoson de amikeca kunestado simpla vorto ne ekzistas pro remalapero de tiu kelktempe aplikata termino.

## 2. Precizeco.

- a) En fakaj lingvoj ofte troviĝas nuancoj, kiujn simplaj vortoj ne povas kontentige esprimi. Ĝenerale sufiĉas por sistema kunestado la vorto „kunveno”, sed la internacia juro devas diferencigi inter pluraj tipoj. La homoj kunvenintaj nomiĝas do „assembleo”, kaj la kunrestado mem fariĝas „sesio”, kiu havas subkunvenojn, por kiuj ofertiĝas la vorto „roŭndo”. Do eblas diri, ke assembleo kunvenas por tria roŭndo de la dua sesio (kaj ne: Kunveno kunvenas por la tria subkunveno de la dua kunvenserio). Tiajn vortojn i.a. enkondukas radiostacioj, kiuj dissendas en la Internacia Lingvo kaj kiuj simple bezonas tiajn vortojn; mi mem parolis pri tio jam kelkfoje kun redaktoroj de Pola Radio Varsovio. En la saman direkton, al internacia normigo, celis la laboroj pri la „Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj”, en kiuj mi partoprenis.
  - b) Tiu emo al precizeco ekzistas ankaŭ en la nefaka lingvo. Tre malofta vorto en la Internacia Lingvo estas „mizerikordo” (germane: Barmherzigkeit), kiun Plena Ilustrita Vortaro klarigas per „kompata indulgo”. Eblas nun diskuti, ĉu ne sufiĉas la esprimo kunmetita el la du vortoj ĉiukaze sciindaj, el „kompato” kaj „indulgo” (eble tio eĉ „pardonemo”), aŭ ĉu al la lernontoj de (facila!) planlingvo aldona vorto, nome „mizerikordo” estu altrudita?
- ## 3. Prilaboro de vivosferoj ne jam tralaboritaj.
- a) Aŭto. Esperantistoj ne posedas absolute klaran vorton por la modernaj grandaj ĉefstratoj, germane „Autobahn”. La vortaroj ofertas multajn stratotipojn el la komencaj jaroj de tiu ĉi jarcento, ekzemple ŝoseo, aleo, bulvardo (kelkaj el ili apenaŭ plu uzataj), sed por la moderntipa vojo eĉ la ofte uzata „aŭtovojo” ne estas klarsenca. Ankaŭ la divido de strato en laŭlongajn partojn kaŭzas lingvajn problemojn. Tio ankaŭ validas por la germana, en kiu lingvo ĉiu aŭtisto diras „Spur” (vorto ankaŭ oficiale uzata: „Spur halten!” „Kein Spurwechsel!”), dum la vere oficiala vorto estas „Fahrstreifen”. En Esperanto „spuro” estas nepre malĝusta, ĉar tio estas postlasaĵo. Mi aŭdis la proponon de neologismo: „leno” (el la angla), sed tio ne akceptiĝis. Ĝusta kaj bona estus „koridoro”, sed ĉar ties uzo estas nefamiliara, mi hezitas apliki tiun terminon en tiu senco. Sub prilaborado troviĝas nun granda aŭtiosta vortaro, kies baza materialo estis preparita de sinjoro Boffejon kaj en kies pretigado mi kunlaboradas.

- b) Virinaj aferoj. Temas ekzemple pri subvestaĵoj de virinoj, pri kiuj ĝenerale ne decas paroli. Sed por esperantistoj estas nepre bezonataj, kaj do „kompleta” lingvo devas disponi ankaŭ pri tiaj vortoj. En la suplemento por la Plena Vortaro Gaston Waringhien skribis en oktobro 1953, ke estos tie registritaj vortoj el la „ĉiutaga vivo ne nur de viroj, sed ankaŭ de virinoj kaj infanoj” (ekzemple jartelo = Straps).
- c) Sporto. Por la Olimpiaj Ludoj 1972 en Munkeno la aŭstralia ambasadoro en Germanio Ralph Harry preparis malgrandan vortaron por la partoprenantoj, afero en kiu mi kunagis kiel siatempa prezidanto de la germana landa Esperanto-asocio. Samjare la hungaro Tibo Ujlaky-Nagy verkis 300-paĝan libron „La sporta lingvo en Esperanto”, en kiu li pritraktis la diversajn branĉojn de la sportaj ludoj, tiel donante ĉiujn necesajn esprimojn en ilia kunteksto. Pri la laŭlonga divido de vojo (ĉi-kaze por vetkurantoj) li proponis „vego” (el la germana „Weg”); se tio enkondukiĝus, ekzistus vorto ankaŭ por la aŭtostratoj kun iliaj „koridoroj” (vidu supre). Tiu libro estis sendita al 500 elektitaj lingvistoj por komentariado; ankaŭ mi ricevis ĝin kaj konsilis. Tamen, frua morto de la aŭtoro malebligis al li la plulaboradon pri tiu kampo, pro kio bedaŭrinde la tuta komplekso eklamis – tiel kunludas la sorto.
- 4. Novaj fenomenoj.**
- a) Videbla estas la ŝanceliĝado ĉirkaŭ novaj terminoj. Postkiam homoj komencis forlasi la teron veturante al la steloj, estiĝis la bezono nomi tion kaj tiujn homojn. Plena Ilustrita Vortaro ofertas por ili du vortojn kun malsamaj difinoj: astronauto „veturas inter la astroj” kaj kosmonaŭto „pasaĝero de kosmoŝipoj”. Astronauto estas vorto el la usona lingvouzo, dum el la rusa venas la vorto kosmonaŭto. Fakte sufiĉus unu vorto en Esperanto; ankaŭ la sencdiferenco laŭ PIV estas troa, tamen ne senkaŭza: mi estis informita, ke usonaj ŝipistoj mem stiras, do vere „veturas”, dum rusaj ŝipoj flugas aŭtomate, tiel ke la ŝipistoj kondukas kiel pasaĝeroj. Oni devas vidi, kiu el la du terminoj venkos kaj kiu iam malaperos.
- b) Se la esperantistoj senatente akceptas novajn (teknikajn) terminojn, estiĝas problemoj. Multaj tiaj vortoj devenas el la angla kaj tie finiĝas per la silabo senakcenta „-er”; rekta transpreno en Esperanton tie produktas vortojn kun akcenthava silabo „er”. Tiu serio sonas malbele: helikoptéro, partnéro, kontenéro...
- c) Vera dramo formiĝis ĉirkaŭ la termino por elektronikaj kalkulmaŝinoj: komputoro, komputero, komputilo, komputro? Dum jaroj tio estas diskutata, kaj la koncernata fako en la Akademio de Esperanto eĉ faris skriban voĉdonon, sen atingi unuecan lingvouzon. Detaloj ne estas prezentitaj, ĉar la aŭskultantaro mem konas la argumentojn.
- 5. Modernaj konsciigoj el tutmondiĝo**
- a) Pasintomere mi rigardis lumbildprezentadon de la izraeliano Amri Wandel pri lia

- hejmlando, inter kies bildoj aperis domo por diservoj. La montranto diris: jen kirko – kaj la aŭskultantoj korektis: preĝejo (opiniante la vorton „kirko” superflua neologismo). Sed sinjoro Wandel, judo kaj ne kristano, pravis: estas kristanisma aroganteco nomi sian preĝejon „la” preĝejo, kaj havi aldone en la vort-materialo: sinagogo, templo, pagodo, moskeo. Vera internacia lingvo povas havi nur la tute ĝeneralan vorton por loko de preĝado, do „preĝejo” sen ligiteco al unu kredo, kaj en la tavolo „sub” tiu ĝenerala vorto la specialajn, inter kiuj troviĝu „kirko”.
- b) Por la manĝiloj de Japanio nmi diras „manĝbastonetoj”. Ekzistas laŭ la tre instrua libro de Nakamura „Enciklopedieto Japana” el 1964 la vorto „haŝio”, sed ĝin ne enhavas eĉ Plena Ilustrita Vortaro. Popolo kiu mem ne konas forkon devus laŭ tiu modelo diri pri ĝi „manĝpikileto”. Tio estas nekutima, kaj tio montras ian ligitecon de Esperanto al la eŭropeca kulturo.
- c) Tiu ligiteco ripetiĝas en metaforoj. Por homoj el la grek-romia kulturfono la koro estas la sidejo de sentoj; tial ni finas leterojn per la formulo „kun koraj salutoj”. Laŭ „Enciklopedieto Japana” la sidejo de sentoj en la homo estas la ventro (tial la memmortigo per harakiro estas nehontiga, ĉar la tranĉo en la ventron ebligas al la animo rapidan elflugon al la dioj). La enhavo de „kun koraj salutoj” tial estas redonebla por japanoj nur per „kun ventraj salutoj”. Tio montras, ke en internacia lingvo oni uzu internacie klarajn vortojn, ekzemple apliku la unusencan „kun sinceraj salutoj” (kion mi post ekkono de tiu problemo faras).
- 6. Modernaj konsciigoj pro sendiskriminacia lingvouzo.** Evoluoj en la socio necesigas la adapton de la lingvouzo.
- a) En Plena Ilustrita Vortaro la difinoj por „edzo/edzino” kaj „fianĉo/fianĉino” esence diferencas. En la kazo de edzeco du memstaraj individuoj ekkunvivas, sed ĉe la fianĉeco temas pri vira ago kaj pasiva sinteno de la ino. Antaŭ kelkaj semajnoj mi demandis la aŭtoron de PIV, sinjoron Gaston Waringhien, pri tiu diferenco, kaj li klarigis, ke edzeco estas kaj evidente restas moderna, dum fianĉeco estas jam nun io eksmodiĝanta (junuloj ne plu gefianĉiĝas!). Tio respeguliĝas en la difinoj.
- b) Lastatempe estis diskutata inter la esperantistoj la seksisma lingvouzo, ekzemple ke la pronomo por la substantivo „homo” estas „li”, kio subkomprenigas, ke nur iu „li” estas vera homo kaj ke iu „ŝi” estas nur duarange alkalkulebla al la kategorio „homo”. Ĉar la Esperanto-movado kontraŭbatalas diskriminacion, nome la lingvan, kelkaj esperantistoj trovis tion neadekvata, ke ili aplikas mem sekse diskriminacian lingvaĵon. Tial post voĉdono en la gvida organo de Universala Esperanto-Asocio, la Komitato, la nova Statuto de UEA estas tiel verkita, ke en neniu loko ofichavanto estas nomata „li”. Oni do strikte evitas diri: „La prezidanto gvidas... Li estas elektita por tri jaroj”, timante ke per tio oni esprimas la konvinkon, ke nature prezidanto devas esti „li” kaj nur esceptokaze „ŝi”. Diskutataj estas

eblaj novaj pronomoj por la tria persono sen esprimo de la sekso, ekzemple „ri” aŭ „zi”, kaj multaj nun uzas „li aŭ ŝi”. Same estas kontestata la tro ofta uzo de la sufikso „-ino”, des pli ĉar la personindikaj sufiksoj estas senseksaj laŭ la Fundamento de Esperanto. Tiu afero plej verŝajne fariĝos ankoraŭ granda diskutpunkto.

7. Ŝlifprocezoj. En la Esperanto-lingvaĵo el la fruaj jardekoj de nia jarcento estas kelkaj vortoj, kiuj estas longaj kaj komplikaj, sed kies objektoj tute familiariĝis, tiel ke trafikaj esprimoj estas bezonataj. La lingvouzo ofte ne estas klara, la pli mallongaj formoj ne oficialaj kaj kelkloke ne akceptitaj, tamen ili estas venkantaj.

Ekzemploj estas:

aŭto anstataŭ aŭtomobilo;

radio anstataŭ radiofono (PIV) el la kunteksto de la oficiala radiko „radiofono”, ofte aŭdiĝas „radioricevilo”;

kinejo el „kino” (analoge al „operejo/opero”) devenanta de la Zamenhofs „kinematografo”, sed ankoraŭ pli familiara estas la uzo de „filmo”, el kio venas „filmejo”, sed tio ne estas uzata;

dia (ekzemple en la formo „diaprelego”) anstataŭ „diapozitivo”, kvankam „dia” devus rilati al „Dio”, eble „diao” = lumbildo kaj el tio „diaprelego” per ellaso de la „o”;

foto anstataŭ fotografaĵo.

El: *Paderborner Arbeitspapiere, FEoLL 1981*

**La ILS bezonas geïnstruistojn el 5 kontinentoj.**

## Ĉu ni bezonas novan sufikson?

Malte Markheden, Svedujo

Relative ofte mi faras notojn pri birdoj aŭ aliaj bestoj. Mi kredas, ke kiam mi skribas la vorton besto, tiu ampleksas kaj la masklan kaj la femalan sekson. Kaj kiam mi skribas ekz. leporo, erinaco, fringo, merlo, cigno ktp., mi opinias, ke ankaŭ tiuj vortoj ampleksas ambaŭ seksojn. Kelkfoje mi devas difini la sekson kaj tiam skribas ekz. „vircigno” aŭ „cignino”. Se temas pri bruto, mi povas demandi ekz. „virbovo” aŭ „bovino”. Tiam oni kompreneble povas demandi sin: kial ne ekzistas sufikso por la maskla sekso same kiel por la femala!

En la gazetoj *Semajna Bulteno* kaj *Mundo* mi legis artikolojn pri ĉi tiu afero. Tie mi ankaŭ vidis proponojn pri tia sufikso por la vira (aŭ maskla) sekso: *-iĉ*, *-im* aŭ *-ur*. Do ekzemple anstataŭ „virbovo” mi skribus „boviĉo”, „bovimo” aŭ „bovuro”. Ĉu aliaj proponoj estas eblaj? Mi ne povas trovi iun. Laŭ mia opinio la sufikso *iĉ* estas malbona, ĉar la ĉ-sonoj malbeligas la lingvon. La *Mundo*-redaktoro opinias, ke *-im* estas maltaŭga, ĉar ĝi tro similas al *-in*. Kion opinias niaj legantoj?

Ĝuste nun mi skribis la vorton „legantoj”. Ĉu ili estas inaj aŭ viraj? Mi esperas, ke ili estas el ambaŭ seksoj.

Nu, mi spertis, ke kelkaj esperantistoj opinias, ke la vorto „leganto” esprimas nur la viran sekson. Mi tiukaze devus skribi „niaj gelegantoj”! (Kaj kiam mi skribas pri la leporoj ĝenerale, mi skribus „la geleporoj”.)

Tamen mi esperas, ke oni ne havu tiom komplikitan lingvon. Se mi turnas min nur al la inaj legantoj, mi povas skribi „legantinoj”, se nur al la viraj mi devas skribi „viraj legantoj” aŭ eble „virlegantoj”. Mi spertas, ke estus pli facile havi ankaŭ viran sufikson, do ekz. „legantimoj” aŭ „leganturoj”.

En la supre menciitaj gazetoj mi ankaŭ vidis diskuton pri la sufikso *-ul*. Iu diskutanto diras, ke *-ul* signifas nur virajn estaĵojn. Sed laŭ PIV *-ul* signifas individuon, personon, karakterizitan per tio, kio la radiko esprimas. Do „fremdulo” estas fremda persono, ina aŭ vira, „riĉulo” estas ina aŭ vira riĉa persono ktp. Junulo do devas esti juna persono, vira aŭ ina. La pluralo „junuloj” sekve havas la saman signifon kiel „junaj homoj”, sed ne diras ion pri la sekso. Se oni volas akcenti, ke ili estas el ambaŭ seksoj, oni povas uzi la vorton „gejunuloj”. Sed se ili estas nur viraj, mankas al mi sufikso por esprimi tion. Kaj la vorto „virjunuloj” estas iom peza.

Ne estas eraro krei novajn vortojn por esperanto, se la vortoj estas bezonaj. Nebezonaĵojn vortojn multaj eltrovas. Kiu ekzemple eltrovis la malbelan kaj nebezonaĵon prepozicion „far”, kiu verŝajne signifas „fare de” aŭ „farita de”? Imagu, ke oni farus tiel kun ĉiuj verboj, ekz. „Sveda geografio skrib Erik Svenson”.

Sed sufikso por la vira (maskla) sekso estus vera plibonigo de esperanto. Tial mi volas esperi ke nia Esperanto Akademio tuj eklaboru pri tiu ĉi afero.

El: „La Espero”, Sveda revuo

### Skribu al IPR pri misuzado de nia lingvo.

## Instruistoj – membroj de ILEI!

Se Vi havas Esperanto-lernantojn en la *deviga* lernejo, Vi povas peti stipendion por knabo kaj knabino, kiuj partoprenos infankongreseton aŭ similan aranĝon, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Esperanto amikiĝas.

Detalajn regulojn sendos Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund. Bonvolu aldoni respondkuponon!

### SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo	: Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo	: Mag. Karl Hirmann (estro de SAEI-Societo de Aŭstrijaj Esperanto-Instruistoj) Rannachstr. 3 A-8046 Graz.
Belgujo	: E. van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal. E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout. M. Sondervorst, Rue du Téléphone 1, B-2180 Mettel. H. Lentzen, Feldweg 20, B-4701 Kettenes.
Brazilo	: Elvira Fontes, C. P. 5888, São Paulo.
Britujo	: Hilary Chapman, 34 Liwin Deganwy Conwy Gwinedd LL3 12RA
Bulgarujo	: Marin Bavec, Postkesto 1054, Sofio.
Danujo	: Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo	: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Francujo	: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
F. R. Germanujo	: Ruff Karin, Pappelweg 22, D-315 Peine.
Grekio	: K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).
Hispanujo	: Andrés Martin Gonzáles, Armengual de la Mota, 33, E-2, 4 <sup>o</sup> D, Malaga-7
Hungarujo	: Zsuzsa Barsay, Bem rkp.25/b, H-1011 Budapest
Irano	: M. Saghalian Apt. 7N.34 24 <sup>th</sup> Street, Kuj Nasr Avenue, Teheran 14488
Islando	: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavik.
Israelo	: D-ro Josef Murian, p.p.k. 1289, IL-61012, Tel Aviv.
Italujo	: Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, pèk 11244548.
Japanujo	: Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Jugoslavio	: Miodgrad Stojanović, Omladinakih Brigada 49/III/31, YU-11070 Novi Beograd.
<del>Luksemburgo</del>	: Robert Hoener, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.
<del>Malago</del>	: Eugene Raveloson, B. P. 1663 - 101, Antananarivo
<del>Malto</del>	: Anthony Mercieca - 20 Valletta Road - Qormi
Nederlando	: D. Luesken-Burger, Boerhavestraat 82, NL-7316 LH Apeldoorn.
Nordameriko	: Arthur Eikenberry, 621 Aurora Ave., Santa Barbara, Ca 93109 USA
Norvegiujo	: Elling Strand, Ekebergveien 208, Leilighet 154, Oslo 11.
<del>Nov-Zelando</del>	: Gvenda Sutton, 21 Rama Crescent, Wellington 4.
<del>Polujo</del>	: Mäg. Barbara Chmielewska, Pedagogia Komisiono de Pola Esperanto-Asocio, Ul-Jasna 6, PL 00-013 Warszawa.
Portugallio	: Antonio Manuel Correia Coimbra, Rua Coronel Leitao 20, 1 <sup>o</sup> Esq. Lisboa Marques.
Sanmarino	: Marina Michelotti, via 25 marzo, 73, I-43031 Republica di San Marino.
<del>Sovetunio</del>	: Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV, Nikolaj Starodubcev, Poštrestante SU-3-340047 Doneck.
<del>Sud-Afriko</del>	: Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen.
Sudakoreujo	: So Gil Su – Sodemun P. K. 59, Seŭlo 120.
Svedujo	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.
<del>Venezuelo</del>	: Esteban E. Mosonyi, Apartado 51500, Chacao, Caracas.
Ĉeĥoslovakujo	: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Píbram.
Cinujo	: Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D. R.	: Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brühl.
Kubo	: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Singapuro	: Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Funos Crescent, Singapuro 14.
Zairujo	: Antoine-Samuel Ngangu, B. P. 13, Lukala, Nkandu.

x 6  
x 9

## Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, Pappelweg' 22A, D-315 Peine, F R Germanujo.  
Vicprezidanto: Anica Hurčak, Polić-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Jugoslavio.  
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. Italujo.  
Vicsekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.  
Financoj: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

## Kunlaborantaj Organizoj

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio).  
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:  
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussel.  
FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne - 35 Avenue  
Jottrand 1030 Bruxelles - Belgique. Tel. 02 277 49 36.  
ICEM Esperanto - I, rue Galissonnière - F - 44330 Le Pallet - Francio.  
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.  
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.  
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuigintaj Nacioj, 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.  
Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko:  
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine,  
FR Germanujo

Membreco en I.L.E.I. (30 svedaj Kronoj jare) inkluzivas la ricevon  
de IPR.

abonprezo por nemembroj: 30 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj  
aerpoŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). La Internacia Ligo de  
Esperantistaj Instruistoj - ILEI . Södra Rörum  
pl. 455. S- 242 00-Hörby. (Svedujo)
2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 —  
UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro